# *La  -a de marto*

*Tasko : Legu la suban tekston kaj kompletigu ĝin per la mankantaj eroj.*



- Hodiaŭ estas la oka de marto, la Tago de Virinoj – diras Petro al sia edzino, - vi faros neni_____, *vi ripozos* kaj ni festos vin.
- Kaj la matenmanĝo, k______ mi ĉiutage portas al vi en la lit____ ?



- Nu, bone, tio povas esti, alporti la matenmanĝ_____ ne estas laboro; *poste vi ripozos*. Dumtempe vi povos pur_____ miajn ŝuojn, tio ne estas laboro, nur iom da gimnastik______, eĉ amuziĝo; *poste vi ripozos*. Promenante en la urbo iru al la bazaro, tio estas higiena promenado, faru aĉet______, tio estos por vi nur bona amuziĝo.
- Kaj la tagmanĝo ? – demandas la edzino.



- Fakte ni povus manĝi en restoracio, sed ti_____ mi ne tre ŝatas. Vi scias, ke mi toleras nur la hejmajn manĝojn. Sed aŭskultu; vi ripozas dum la tuta tago, vi povus tamen prepari modest_____ tagmanĝ_____, ekz.: buljon_____, iom da bovidaĵ_____ kun tomatsaŭc______, malmulte da fritita_____ terpom_____ kun iom da salat______, kaj nenion pli. Nu, tamen, vi povus baki ankoraŭ iomete da kuk_____ por poste frandi ĝin. Eble kun nuks______ . Kelk_____ nuks_______ vi povas senŝeligi ludante. Poste mi trinkos tas_____ da teo kaj *poste vi ripozos*.



- Kaj la telerlavado?
- Jen, tiaj estas la virinoj! - diris grumblante Petro. – Dum la tuta tago vi ripozas kaj poste eĉ la telerlavado estas doloriga laboro. Por la vespermanĝo vi ne bezonas labori. Fritu nur hepat_____ kun salato kaj *poste vi povos ripozi*. Mi frue enlitiĝos, ja vi scias ĉiu festeno lacigas m_____. Sed eble vi povus aĉeti por mi litron da vin____, ĉar mi kun plezuro trinkus ĝin je la Virina Tago kaj kompreneble je via sano. *Poste vi ripozos*.

Kara, restas nur kelkaj aferoj: gladu mi_____ pantal____, lavu mi_____ ŝtrumpet_____. Fakte mankas unu buton_____ sur mia palto, sed tio por vi estas neni_____, ja vi dum la tuta tago nur festis kaj ripozis…



# La 

-a de marto

## SOLVO:

- Hodiaŭ estas la oka de marto, la Tago de Virinoj – diras Petro al sia edzino, - vi faros nenion, *vi ripozos* kaj ni festos vin.
- Kaj la matenmanĝo, kiun mi ĉiutage portas al vi en la liton?
- Nu, bone, tio povas esti, alporti la matenmanĝon ne estas laboro; *poste vi ripozos*. Dumtempe vi povos purigi miajn ŝuojn, tio ne estas laboro, nur iom da gimnastiko, eĉ amuziĝo; *poste vi ripozos*. Promenante en la urbo iru al la bazaro, tio estas higiena promenado, faru aĉetojn, tio estos por vi nur bona amuziĝo.
- Kaj la tagmanĝo ? – demandas la edzino.
- Fakte ni povus manĝi en restoracio, sed tion mi ne tre ŝatas. Vi scias, ke mi toleras nur la hejmajn manĝojn. Sed aŭskultu; vi ripozas dum la tuta tago, vi povus tamen prepari modestan tagmanĝon, ekz.: buljonon, iom da bovidaĵon kun tomatsaŭco, malmulte da frititaj terpomoj kun iom da salato, kaj nenion pli. Nu, tamen, vi povus baki ankoraŭ iomete da kuko por poste frandi ĝin. Eble kun nuksoj. Kelkajn nuksojn vi povas senŝeligi ludante. Poste mi trinkos tason da teo kaj *poste vi ripozos*.
- Kaj la telerlavado?
- Jen, tiaj estas la virinoj! - diris grumblante Petro. – Dum la tuta tago vi ripozas kaj poste eĉ la telerlavado estas doloriga laboro. Por la vespermanĝo vi ne bezonas labori. Fritu nur hepaton kun salato kaj *poste vi povos ripozi*. Mi frue enlitiĝos, ja vi scias ĉiu festeno lacigas min. Sed eble vi povus aĉeti por mi litron da vinon, ĉar mi kun plezuro trinkus ĝin je la Virina Tago kaj kompreneble je via sano. *Poste vi ripozos*.
- Kara, restas nur kelkaj aferoj: gladu mian pantalon, lavu miajn ŝtrumpetojn. Fakte mankas unu butono sur mia palto, sed tio por vi estas nenio, ja vi dum la tuta tago nur festis kaj ripozis…